# *La municipo, ?losila aganto por evoluo sur la loka nivelo*

*Image not found or type unknown*

**Foto: Granma**

Havano, okt 15 (RHK) La graveco de la respondeckunveno de la delegito al siaj vo?donantoj, kiel ideala spaco por da?re konstrui nian socialismon el la kvartalo, estis ratifita de la membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Partio kaj prezidanto de la Parlamento, Esteban Lazo Hernández.

Gvidinte la kunvenon kun prezidantoj de la urbaj asembleoj de Popola Povo el la tuta lando, responda al la monato oktobro – okazigita per videokonferenco–, Lazo Hernández emfazis, ke tiu ?i transcenda politika procezo havas la plian instigon festi ?i-jare la 50-an datrevenon de la starigo, kiel sperto, de la Lokaj Korpoj de Popola Povo en la provinco Matanzas, konsciante ke – kiel esprimis nia ?efkomandanto – “la povo de la popolo, tio estas potenco”.

Homero Acosta Álvarez, sekretario de la kuba le?dona periodo, raportis, ke la rezultoj estas superaj, konsiderante la kvaliton de la administraj raportoj prezentitaj de la delegitoj, la organizado de la procezo, la popola partopreno, inter aliaj elementoj.

«El la plano de pli ol 65 000 kunvenoj planitaj por okazi inter la 20-a de septembro kaj la 15-a de novembro en la tuta lando, ?irka? 51%  estas jam plenumita. La procezoj okazigitaj pruvis la popolan agnoskon de la delegitoj, kiuj respondecis pri sia laboro, kaj praktike estis plimulta subteno por ?i tiu rezulto de ilia administrado," li diris.

Same, dum la kunveno, oni emfazis la gravecon de la lokaj instancoj de Popola Povo en la plenumo de la agoj respondaj al la municipoj, en la projekcioj de la Registaro por korekti misprezentojn kaj reakceli la

ekonomion.

Fonto: Granma

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/367486-la-municipo-slosila-aganto-por-evoluo-sur-la-loka-nivelo

**Radio Habana Cuba**